# TEA-BULTENO

10$^{A}$ JARO — SPECIALA NUMERO — FEBRUARO 2007


## TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

## Raportoj de Prezidanto kaj Sekretario pri agado en 2006$^{a}$ Jaro

*legitaj dum la Jara Asembleo, dimanĉon la 14$^{an}$ de januaro 2007$^{a}$*

*Parolas la Prezidanto, Edvige Tantin Ackermann:*

Estimataj Asocianoj, karaj geamikoj!

Bonvenon al vi en tiu ĉi jarkunveno, la unua post la centjariĝo. Per ĝi startas laboro kaj agado favore al TEA kaj Esperanto dum nia dua jarcento, kies celebro okazos en la jaro 2106.

Ĉu TEA plue ekzistos? Ĉu en la jaro 2106 oni tion celebros? Ĉu Esperanto estos vivanta aŭ ĉu Esperanto estos komplete forigita el la rolo de internacia helplingvo per ia nacia lingvo?

Neniu el ni povas respondi al tiuj ĉi demandoj, neniu el ni en la jaro 2106 havos la eblecon spekti kaj atesti la intertempajn okazintaĵojn, neniu el ni kunlaboros por celebri la eventon, malgraŭ la progresoj de la medicina scienco.

Tamen, ankaŭ danke al agado nia kaj de niaj posteuloj, de nun ĝis tiam, ĉio dependos kaj estos strikte kunligita.

Dum tiu ĉi nia unua jarcento ne estis ĉiam facile antaŭenporti la torĉon de esperantismo. Same ne estos en la ĵus komenciĝanta dua. Se ni kapablis obstine labori ĝis nun, tion ni ŝuldas al la multaj samideanoj kiuj dum la pasintaj tempoj strebis por antaŭeniri, por disvastigi Esperanton kaj ĝiajn idealojn, por konstanta zorgado pri eta flameto kiu montras la vojon elektitan, rekte, kuraĝe kaj ne-flankiĝante.

Nun estas nia tasko same agi, antaŭeniri, zorgi pri tiu flameto, tiamaniere ke aliaj homoj, kiuj prenos enmane la sortojn de TEA kaj de Esperanto en Triesto kaj en nia regiono, povu rikolti pli da sukcesoj, salut-aklami enradikiĝon de Esperanto, ĝian laŭeble oficialan rekonon kaj jes… ni kuraĝu diri «la Venkon».

Tuj post mi, vi aŭdos la raporton de la sekretariino, detala kaj preciza. El ĝi, vi konstatos kiom da laboro ni sukcesis plenumi lastjare. Kaj kiom digne, ni celebris nian gravan datrevenon.

Por tio, ni elektis vojon pezan kaj komplikan, plenan je surprizoj kaj malfacilaĵoj. Ni volis, ke celebrado de centjariĝo estu io eksterordinara, kiu ne daŭru unu-du tagojn kaj poste estu flankenmetita kaj duonforgesita. Ni opiniis, ke centjariĝo valoras multon kaj indas batali por atingi ion kundividendan kun aliaj esperantistoj kaj kun multaj neesperantistoj, kiu restu en la memoro dum longa tempo. La evento, aŭ pli bone, la eventoj, okupis la tutan jaron. Nur mencio nun, detalojn vi aŭdos poste. Kio plej sukcesa?

Ĉu la solena Diservo kun la partopreno de nia Episkopo kaj de la Koruso MAX REGER?

Ĉu la ekspozicio “Kara amiko, mi skribas al vi…” ĉe *Palazzo Costanzi*, vizitita de pli-malpli 1500 personoj?

Ĉu la internacia renkontiĝo “Inter Karsto kaj Maro”?

Ĉu la prelegoj de Romano Bolognesi kaj Fabrizio Pennacchietti?

Plue: la afero ne finiĝis, ni lanĉis internacian konkurson pri kurtfilmoj, kiujn ni spektos dum la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO venontfebruare.

Koran kaj varman dankon al ĉiuj kiuj kunlaboris, kaj estis multaj inter vi, por optimuma realigado de la diversaj programeroj.

Apartan, koran kaj varman dankon al Ingrid Signore, Lida Pieri, Devana Pizziga kaj Elio Nocent, kiuj bonvolis kunlabori ankaŭ per financa helpo. Mi aparte mencias s-inon Ingrid Signore, kiu per konsiderinda sumo volis subteni nian centjariĝon ankaŭ memore de sia edzo. Tiu financa helpo estis gravega kaj tre bonvena: TEA estas tre dankema kaj volas ĉi tie adresi al ili fortan aplaŭdon kaj ĉirkaŭbrakon.

Ĉiuj aranĝoj estis sufiĉe multekostaj, malgraŭ la subteno ricevita de la Triesta Komunumo, dank' al la skabenoj Lorenzo Spagna kaj Massimo Greco, kaj de la Volontula Servo-Centro de nia Regiono. Verdire ni atendas ankoraŭ informojn pri financa subvencio de la Provincaj Instancoj, espereble en la venontaj tagoj oni scios ion precizan. Estas fakto ke ni jam elspezis, oni ja ne povis atendi ĝis nun, ĉu ne ? Do, ni havu fidon. Se la informoj estos negativaj, ni troviĝos en tre malfavora financa situacio. Sed, mi ripetas, ni havu fidon almenaŭ en la sindonemo de niaj asocianoj, de vi ĉiuj, kiuj permesos pli trankvilan alfronton de elspezoj tuj komence de la nuna jaro.

Nia batalo kun mono neniam ĉesas: elspezoj kaj enspezoj estas tikla temo. Dank' al malavareco de kelkaj inter vi, TEA ĉiam sukcesis solvi la financan parton de la laboro. Bonvolu konsideri ke asocian kotizon oni pagas precipe por subteni la ideon, la agadon, la asocion mem kaj ĝiajn celojn.

La jaro 2006 estis tre pozitiva, miaopinie, kaj supozeble tio influos ankaŭ la estontan agadon. Ni starigis varmajn rilatojn kun kelkaj personoj kaj kunlaborado espereble floros.

Ni ne forgesu nian ĉefan taskon: instrui kaj disvastigi Esperanton. Tio estas atingebla laŭ diversaj multfacetaj vojoj: bonvolu helpi en tio, sugestu pli taŭgajn rimedojn, proponu vin por engaĝigo en ia speciala programero.

Pri la projektoj en la jaro 2007, ni parolos kaj diskutos poste: via opinio estas grava kaj via konkreta helpo eĉ pli.

Kaj por fini, kiel mi diris pasintjare: TEA estas vi, helpu ĝin en realigado de novaj agad-planoj kaj sukcesoj.

**TEA kaj Esperanto vivu kaj prosperu!**

---

*Raportas la sekretario Elda Doerfler*

Karaj TEA-anoj!

Kiel bone sciate, la jaro 2006ª estis plene dediĉita al festado de la 100-jariĝo de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO. Ĉiuj, ĉi tie kunvenantaj, certe ankoraŭ bone rememoras pri la diversaj aranĝoj organizitaj, sed estas kun ĝojo kaj plezuro ke mi nun aŭdigos al vi la resumon de la eventoj. Ne ĉio, kio eniris la unuan skizitan programon, estis realigita, sed mi povas aserti al vi, ke 90-procente estis konkretigitaj la planoj, per niaj fortoj kaj danke al via kunlaborado, ĝisfine.

Antaŭ ol listigi la okazintaĵojn de jaro 2006ª, ni rememoru ankoraŭ foje pri la Ekspozicio de Kripoj kaj la Internacia Konkurso MIA KRISTNASKA KRIPO, aranĝo kiun ni iniciatis en la jaro 2005ª, sed kiu daŭris ĝis la 5ª de januaro 2006ª, dato kiam estis fermita la ekspozicio kaj de kripoj kaj de la ellaboraĵoj venintaj el diversaj Eŭropaj Landoj, nome el Ĉeĥio, Francio, Kroatio, Litovio, Pollando, kaj el Triesto. Post tio oni anoncis la rezultojn de la konkurso kaj al la konkursintoj oni sendis perpoŝte kaj diplomojn kaj premiojn, dum la disdonado de la premioj al la tri partoprenintoj de Triesto okazis la 28ªⁿ de januaro dum la Jara Asembleo. Plejparto de la unuaj premioj estis disponigita de la tiama Komunuma Skabeno Lorenzo Spagna. Pri tiu ĉi nia aranĝo Marija Belošević preparis kompaktan diskon en tri lingvoj: esperanto, itala, kroata, kiu komence de tiu ĉi jaro estis premiita en Dubrovnik (Kroatio) dum internacia konkurso pri Kristnaskaj Kripoj.

Kaj nun pri la ĉijaraj aranĝoj. Festado de la 100-jariĝo de TEA komenciĝis per:

★**SOLENA MESO EN ESPERANTO,** ĉe la Preĝejo Beata Virgulino de l'Rozario, sabaton la 13ªⁿ de majo, je la 17ª horo. Celebrantoj estis la pastroj don Antonio Dessanti kaj don Nello Marcuzzi el Udine. La triesta Episkopo Eugenio Ravignani honoris nin per sia tuttempa ĉeesto kaj per sia parolado, en Esperanto! La Di-servan riton akompanis per sia altnivela kaj sugestoplena kantado la Koruso MAX REGER, direkte de Majstro Bruno Del Caro. La preĝejo estis plenplena kaj la etoso vere solena kaj emocia. Por la okazaĵo estis presitaj ĉirkaŭ 350 afiŝoj (projektitaj de Eraldo Sepulcri), kiuj estis dissemitaj tra la urbo dum deko da tagoj, kaj ĉirkaŭ 200 libretoj kun tekstaro kaj kantaro por la meso; plie en ili estis metitaj mallongaj informoj pri la Internacia Lingvo kaj historio de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO. Estis senditaj plurcentoj da invitiloj.

★**EKSPOZICIO DE ESPERANTAJ BILDKARTOJ** "Kara Amiko, mi skribas al vi…": organizita de Triesta Komunumo, Departemento pri Kulturo, kunlabore kun TEA, en la prestiĝa *Palazzo Costanzi* ekde la 10ª de junio ĝis la 2ª de julio. Inaŭguro okazis vendredon la 9ªⁿ de junio je la 18ª horo. La ekspozicio estis vizitebla de la 10ª ĝis la 13ª, kaj de la 17ª ĝis la 20ª horoj. Ĉi-okaze estis eldonitaj du diversaj filatelaj stampoj: la unua funkciis ekde la 5ª ĝis la 10ª de junio kaj per tiu estis stampitaj ĉiuj korespondaĵoj forvojaĝintaj de Triesto kaj Goricio; la duan oni povis ricevi ĉe la ekspoziciejo lundon la 12ªⁿ de junio ekde la 14ª ĝis la 20ª horo. En la salono de la Palaco estis elmontritaj ĉirkaŭ 300 kartoj datiĝantaj de la jaro 1906ª ĝis la jaro 2006ª, kiuj estas parto de la kolekto de Elda Doerfler. Realigadon kaj muntadon de la ekspozicio tia kian vi povis admiri, oni plenumis ankaŭ danke al la valorega kaj profesieca kontribuo de Davide Amadei el Bolonjo, kiu multfoje venis al Triesto, jam ekde februaro, por helpi en la preparlaboroj kaj kiu per siaj ideoj kaj granda sperto en la kampo donis gravan elanon al sukcesigo de la tuta aranĝo. La ekspozicio estis vizitita de ĉirkaŭ mil kvincent personoj, ne nur triestaj sed ankaŭ el nia regiono, el Italio kaj el multaj aliaj mondopartoj: jam tio donas la ideon pri la kontentiga rezulto, konsidere ankaŭ de la periodo kaj de temo ne tiom vaste konata de la publiko. Krome pluraj Komunumaj Skabenoj, inkluzive de la Urbestro, vizitis la Ekspozicion.

Estis preparita tute aparta kaj nekutima libro por la subskriboj de la vizitantoj, el kiuj ĉirkaŭ kvincent lasis en ĝi sian komenton aŭ opinion. En la salono estis ankaŭ alia libro, enhavanta centon da artikoloj, la plej interesaj kaj okulfrapaj, aperintaj en triestaj tagĵurnaloj, ekde la fondiĝo de nia asocio ĝis junio 2006ª. TEA zorgis pri presado de 600 poŝtkartoj, kun du diversaj bildoj: unu kun la emblemo de la centjariĝo kaj la alia kun placo de Unuiĝo de Italio, ambaŭ faritaj de Sepulcri, kiu interalie okupiĝis pri la aspekto de priekspoziciaj afiŝoj. Por prezenti la ekspozicion, estis farita ankaŭ gazetara konferenco ĉeeste de komunumaj aŭtoritatuloj kaj ĵurnalistaro. Rilate al propagando, la Komunuma Departemento pri Kulturo presigis la 400 afiŝojn (el kiuj 350 tra la urbo dum du plenaj semajnoj) kaj 2000 invitilojn, pri kies sendado zorgis ties sekretariejo. Plie, varbilo pri la ekspozicio estis presita 5mil-ekzemplere. Sur la fasado de Palaco *Costanzi* pendis du grandaj afiŝoj, kaj du aliaj, samaspektaj, estis metitaj centraurbe.

Kompreneble reklamado pri la aranĝo estis farita pere de ĵurnalaj, radiaj kaj televidaj kanaloj: en la tagĵurnalo IL PICCOLO, ĉiutage aperis anonco pri la ekspozicio en la Kultura Rubriko. Deĵoris en la ekspoziciejo ĉiutage, eĉ en la festo-tagoj, Edvige kaj aliaj TEA-anoj, kiuj disdonadis varbilojn kaj reklamilojn ĉiuspecajn, klarigis pri la elmontritaj kartoj kaj Esperanto ktp.

Dum la ekspozicio, nia prezidanto, kiel kutime tre entreprenema, sukcesis ricevi la promeson flanke de la Komunuma Skabeno pri Kulturo Massimo Greco, pri restaŭro de la pentrita portreto de nia pioniro Arturo Ghez, promeso plenumita de fakulino, laboranta ĉe la Urbaj Muzeoj, sub direktorado de d-ro Dugulin. Ni rericevis ĝin komence de oktobro, tute bele reparita kaj purigita.

Kuriozaĵo: dum vizito de la ekspozicio la senatano Giulio Camber virtuale aliĝis al nia Asocio per pago de konsiderinda kotizo.

★ **Dimanĉon la 11ªⁿ de junio,** grupeto de TEA-anoj iris al Tombejo Sankta Anna kaj honoris, per siaj vizito kaj memorigaj paroladetoj, ĉe la respektivaj tomboj, kelkajn el la plej eminentaj triestaj esperantistoj, kiuj multon agadis, favore al disvastigo de Esperanto kaj al pluvivado de nia asocio.

★ **En julio estis lanĉita** la unua Internacia Konkurso nomita "KURTA KINOESPERANTO FESTIVALO". Interesatoj povas partopreni per kurta filmo, en formo de DVD aŭ VHS, daŭranta maksimume 15 minutojn, en itala kaj/aŭ esperanta lingvoj, pri ĉiu ajn temo elektota de la aŭtoro. La verkoj estos prezentataj al publiko okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO (19-25 februaro 2007). Estos aljuĝataj premioj en formo de pokalo, memorŝildo, libroj ks. Regularo kaj aliĝiloj troveblas ankaŭ interrete. Mardon la 5an de septembro okazis gazetara konferenco ĉe Kafejo Tommaseo. Ĉeestis pluraj interesitoj. Entute ĝis nun alvenis 7 konkursaĵoj el Italio, Kroatio, Litovio kaj Ukrainio.

★ **1A INTERNACIA SOMERA RENKONTIĜO** "Inter Karsto kaj Maro", okazis de la 6a ĝis la 12a de aŭgusto. Ne multaj bedaŭrinde estis la partoprenintoj, sed ili same ĝuis interesan kaj riĉan turisman programon. Ankaŭ ĉi-okaze estis preparita kaj presita libreto enhavanta turismajn informojn pri Triesto, ĝiaj historio kaj ĉirkaŭaĵoj, specife pri la programitaj vidindaĵoj.

★ **En oktobro kaj novembro** okazis serio de 5 prelegoj, ĉe *Assicurazioni Generali*, Salono *Baroncini*, pri "la homo kaj la komunikado". Prelegis d-ro Romano Bolognesi el Bologna. En novembro, prof-ro Fabrizio Pennacchietti proponis, ĉe la Supera Lernejo pri modernaj lingvoj por interpretistoj kaj tradukistoj la problemon: "Kiel klasifiki prepoziciojn ? Nova propono".

★ **ĜEMELIĜO KUN LA ESPERANTO-GRUPO DE RIJEKA** okazis dimanĉon la 17an de decembro. Estis pretigita interesa programo por la gastoj kaj asocianoj: vizito de la Muzeo pri Antarkto, koncerto de la Koruso de la Tri-Aĝa Universitato, direkte de M° Lucio Verzier, en la Salono Beethoven de GERMANA BONFARA INSTITUTO kaj, fine, bongusta bufedo. En TEA-sidejo okazis la oficiala parto de la ĝemeliĝo, kun interŝanĝo de donacoj kaj memoriga ŝildo. Ĉijare la esperantistaro de Rijeka celebros la 100-jariĝon de sia asocio, do tiuokaze ankaŭ ni intervenos, kunlabore aŭ almenaŭ ĉeeste.

Per tiu ĉi ero finiĝis la tutjara celebrado de 100-jariĝo de nia TEA, sed – verdire – entute ne ĉio estis finfarita, nome ankoraŭ restas la verkado de la libro pri **Historio de Esperanto en Triesto**. Tio postulas tre fortan kaj konstantan sindediĉon, ĉar ne simplas improvizi sin verkisto, por prezenti la historion en bona stilo, flua kaj klara, kaj, ĉefe, ne ian listigon de la diversaj eventoj aŭ okazaĵoj. Giacomino Martinez el *Udine* elfosis grandan parton de la okazintaĵoj kaj preparis la unuan libroskizon, Edvige Ackermann grandparte zorgis (kaj ankoraŭ zorgas) pri ties kunmetado kaj kompletigo, krome jam disdonis la faritaĵon al prijuĝo de kelkaj asocianoj. Sed ankoraŭ multo farendas. Se iu havas intereson kunlabori, li/ŝi bonvolu sin anonci.

Kaj nun, laŭkutime, ion pri la dumjara, rutina, aktivado, enkluba kaj eksterkluba, en pli detala formo.

***Enklubaj programoj***

Por ne ripeti kion mi estis dirinta en la pasintaj jaroj, senkomente, mi nur listigas la plej interesajn kaj allogajn erojn, programitajn por la vendredaj vesperoj, kiuj, kiel kutime, estis tre malnombre vizitataj. Okazis projekciadoj de diapozitivoj, de filmoj pri Triesto, Litovio kaj Florenco, gramatikaj ekzercadoj (verboj plus prepozicioj kaj prefiksoj, akuzativo, trafoliumado de PIV, ktp). Daŭre vekas interesiĝon ĉe TEA-anoj la vesperoj dediĉitaj al *Lecturae Dantis en Esperanto, itale kaj triestadialekte*, tial oni daŭrigos laŭ tiu vojo.

**Mardoj** kutime estas dediĉataj al diversaj ordinaraj asociaj laboroj, aŭ – kiel antaŭe dirite – al prilaborado de libro pri TEA.

**Lundo** estas la tago de virinvoĉa Koruso LA VERDAJ ANĜELOJ, kiu, sub la pacienca direktorado de Devana Pizziga, sin ekzercas. Sed ankaŭ ŝi bezonas vin: oni akceptas tre volonte aliajn kantist/in/ojn!

**Tradiciaj festoj:** la Kristnaska kaj la Jarfina. Jen du belaj momentoj por kune restadi, en gaja kompanio, precipe kiam la tutjara laborado jam elĉerpis ĉiujn energion kaj forton kaj oni eksentas la bezonon finfine iom malstreĉiĝi. Paĉjo Krisnasko estis ankaŭ ĉijare tre grandanima kaj surverŝis nin per ĉiaspecaj donacoj, dum la ĉiam pli nombraj, bravegaj kuiristinoj pretigis frandindajn bongustaĵojn. Varma etoso, bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj forgesigis la dumjarajn problemojn kaj ŝargis ĉies eluzitajn bateriojn.

**Esperantistaj gastoj en Triesto**: dum la jaro vizitis nin Andrea Montagner el Milano, Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, la japanino Hirai Isako, kiu vizitis nin du tagojn antaŭ la UK en Florenco; paro el Germanio kiuj feriadis ĉisomere du semajnojn en nia urbo.

**Eksterklubaj programoj:**

**Dimanĉon, la 8an de januaro**, je la 11a horo ĉe la Preĝejo *Beata Vergine delle Grazie*, en *via Giustinelli*, pastro Johann Ammer celebris Meson esperantlingvan akompanitan de la kantoj de nia koruso LA VERDAJ ANĜELOJ.

**La 17an de novembro** pluraj asocianoj ĉeestis prelegon ĉe salono de la Internacia Centro de Teoria Fiziko pri la temo: "**Energio kaj eltenebla evoluo**", organizita de Centro UNESKO de Triesto, okaze de kiu Edvige Ackermann ricevis de tiu organizo, por TEA, belegan memoraĵon esperanto-teman.

**La 19an de novembro,** en Kaštelir, la festado de la "Nova Vino" allogis multajn esperantistojn de Triesto kaj Rijeka. Bonega la kunestado, varma la etoso, danke al tre afabla gastamo de Marĉelo Trampuh.

**Zamenhofa Festo**: ĉijare ni celebris la naskiĝdatrevenon de nia Majstro per interesa prezento, fare de Elena Zerpini, pri la deveno de liaj persona kaj familia nomoj.

**Tradiciaj Esperanto-renkontiĝoj**

**Semajno de Internacia Amikeco** – pro troa laboro kaj okupiteco cele al celebrado de la 100-jariĝo, nenio estis organizita tiuokaze.

**Festo de Amikeco sur Monte Forno.** Ĉi-jare kvarope ni surgrimpis la monton, sur kies supro ni renkontiĝis kun vere internacia grupeto de esperantistoj: fakte, danke al samtempa kunsido de IFEF-estraranoj, ni toste kunfestis kun geamikoj el Bologna, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Slovenio, kaj, memkompreneble, kun la nelacigebla aŭstria amiko Martin Stuppnig.

**Pri kongresoj/konferencoj**. Aŭguste UK en Florenco kaj TEJO-Kongreso en Sarajevo; oktobre, unutaga renkontiĝo en Grado okaze de la 25a fondiĝdatreveno de NOVA ESPERO FRIULI, organizita kunlabore kun la Kultura Fervojista Organizo en Udine (prelego de d-ro Romano Bolognesi kaj filatela kaj libra ekspozicioj);

novembre, en Milano, tritaga festa programo por la 100-jariĝo de la tiea Esperantista Centro.

**Pri ekstera informado**

La preskomunikada servo, zorgita de nia prezidanto, bonege funkcias, ĉar amaskomunikiloj abunde estas superŝutataj per diverstemaj anoncoj, informoj kaj artikoloj pri TEA-agado. Kompreneble ne ĉiam ĉio aperas sur la ĵurnaloj aŭ estas disaŭdigata radie aŭ televide, precipe nia tagĵurnalo IL PICCOLO tute malatentas nian aktivecon. Nu, tamen, konstante kaj senĉese ili ricevadis kaj ricevadas komunikojn, ĉefe kiam temas pri gravaj aranĝoj kiel en la ĵus pasinta jaro. Danke al tia informado, redakcioj de RAI3 kaj TELE4 donis iom pli da atento al ni, prezentante erojn de niaj eventoj.

**Alirprogramoj** de RADIO UNO kaj RADIO TSA: jam fariĝis tradicio la daŭra prezentado de la diversaj aspektoj kaj de la lingvo internacia kaj de la vivo de TEA. Jam spertaj, la parolantoj disaŭdigas kaj novaĵojn kaj malnovaĵojn, en la itala kaj slovena lingvoj. La radio-skipo konsistas el Devana, Edvige, Elena, Elio kaj Laura. Ĉirkaŭ 15 dissendoj okazis en ĉiuj monatoj de la jaro, escepte de aprilo, junio, julio kaj decembro. La tekstoj plejparte estas preparataj de Edvige kaj kelkaj de Devana, kiu ankaŭ prizorgas la tradukadon en la slovena. Krome, nia tre entreprenema anino Devana estis dufoje intervujita en junio de RAI TRST A, kadre de du diversaj programoj, dum kiuj unue ŝi raportis pri la ekspozicio antaŭ ties inaŭguro, kaj due parolis pri Zamenhof kaj lia idealo, disvastigo de esperanto tra la mondo kaj pri UK – la tuto daŭris sume 35 minutojn. Gratulojn al ŝi pro la grava atingo! Notindas, ke ŝi zorgas konstante pri inform-rubriko rilata al Esperanto kaj TEA en la societa ĵurnalo InformaServola. Korajn dankojn al ŝi!

**Kaj, fine, la asocia informilo** TEA-BULTENO regule aperas ĉiun duan monaton kaj sukcesas fojfoje ricevi kelkajn gratulojn pro ties enhavo flanke de eksterlandaj legantoj. Nu, tio instigas min daŭrigi ties redaktadon!

**Pri estrarkunsidoj**: en la jaro oni kunsidis 4 fojojn, sed interrilatoj ĉu telefonaj ĉu retaj aŭ personaj estis preskaŭ ĉiutagaj.

**Pri korespondado**: Leteroj senditaj estis 116, dum ricevitaj 88. Kaj per ĉi lasta informo finiĝas la sekretaria raporto por la jaro 2006ª.

## Alvoko de la Kasisto

Por helpi la asocion daŭrigi en la disvastiga, poresperanta agado, tiom pli nun post ties 100-jariĝo, nepras viaj kunlaboro kaj subteno. Kiel ĝin subteni? Pagante tuj la jaran membrokotizon, kio certigas, almenaŭ parte, pagon de sideja luado. La kasisto krome estas je dispono por transdoni viajn pagojn por abonoj aŭ membriĝoj de UEA, FEI, OSIEK, ELF-AREK ktp.

### NOVELEKTITA ESTRARO DE TEA

★ Edvige Ackermann
★ Elda Doerfler
★ Maria Rosati
★ Giuseppe Valle
★ Elena Zerpini

Maria Rosati, tagon post la Asembleo, anoncis ne-akcepton de la tasko. Laŭstatute, ŝialoke eniras la estraron la unua el la neelektitoj, nome Rosanna Sapla. Bonan laboron al ĉiuj!

**Atentu: estas ŝanĝoj en la februara programo!**

## Februara Programo

| | |
|---|---|
| 02 - vendredo | 20h00 - Prelego itallingva de la baha-ano prof-ro MASRUR Imani pri *"Perchè essere religiosi"* |
| 06 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 09 - vendredo | 20h00 - Priesperanta temo, zorge de Elena Zerpini |
| 13 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 15 - ĵaŭdo | 19h00 - Karnavala Festo, ĉe la Germana Asocio - partoprenkotizo 10 € |
| 16 - vendredo | 20h00 - *Kurta KinoEsperanto Festivalo* - Unua parto |
| 20 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 23 - vendredo | 20h00 - *Kurta KinoEsperanto Festivalo* - Dua parto kaj disdonado de premioj |
| 27 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |

39ª Semajno de Internacia Amikeco
19-25 februaro 2007 en Triesto
Kurta KinoEsperanto Festivalo

Oni povos spekti kaj prijuĝi la kurtfilmojn partoprenintajn en la Internacia Konkurso, lanĉita pasintjare de TEA. Tio okazos en TEA-sidejo, dum la jenaj februaraj vendredoj: la 16ª kaj la 23ª, ekde la 20h00. Ĉiuj bonvenaj!

## KARSTAJ TAGOJ 2007
## PRINTEMPO - 25-30 APRILO

*Triesto atendas vin, deziranta prezenti sian unikan teritorion. La kalkoŝtona altebenaĵo, ĉizita de feinaj manoj, fascinos vin per siaj turitaj ŝtonaj kasteloj, por poste vin inviti al esplorado de la mistera subtera mondo, kie senĉesaj akvogutoj modlis plej fantastajn figurojn.*

Jen la provizora programo:

**25ª de aprilo**
alveno de partoprenantoj, vespermanĝo kaj nokta promenado tra la urbo

**26 – 27 – 28 – 29 – 30 de aprilo:**
★ vizitoj al la Kasteloj de *Miramare* kaj *Duino*
★ pieda promenado laŭlonge Pado *Rilke*
★ prezentado de Karsto kaj ĝiaj grotoj per diapozitivoj
★ speleologia ekskurso en Karstaj kavernoj
★ pieda ekskurso tra tipa karsta valo nomata *Val Rosandra*
★ pieda promenado en mirinda karsta naturo
★ vizito de la urbo kaj de la Muzeo "Speleovivarium"
★ gastronomia itinero inter Karsto kaj maro

**30ª de aprilo** - post tagmanĝo, lasta tostado, salutoj kaj ĝisrevidoj.

Pliaj informoj riceveblas poŝte aŭ rete (adresojn vidu ĉi sube).

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**Grupa ttt-ejo**: ://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
**Poŝta adreso**: CP 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro
IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349